

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, aldono al HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO senpaga por ĝiaj abonantoj. Adreso: Julio Mangada Rosenörn. — Glorieto de Bilbao, 5, MADRID

NUM. 5.—MAJO 1928

LA PROGRESO DE LA H. E. A.

Iam mi parolis pri *tiu*, *kiu* bedaŭrinde semas malsaĝajn dirojn pri morto aŭ ne progreso de nia Asocio, la faktoj kaj atingitaj rezultatoj elpruvadas la malon, sed spite de la rimarkinda vigleco de nia enlanda movado. *tiu* persistadas kvazaŭ celante malfavori la rapidan aŭtaŭenpaŝon de H. E. A.; tial mi konsideras *tiujn tiaj*, *kiaj* estas *sistemaj kontraŭuloj* pri kio ajn. La estraro de H. E. A. estas en konstanta rilato kun la plej viglaj samideanoj el ĉiuj lokoj; ĝi frapas la pordojn de spertaj malnovaj esperantistoj ĉe urboj, kie estis grupoj, kaj iom post iom de ĉie oni respondas favore. Ĉi tion oni povas faris dank' al adresaro de subtenintoj de «Hispana Esperantisto» kaj de «Zamenhofa» Federacio kaj al ĉio, kion starigis ses sinsekvaj jaroj de konstanta interrilatigado mia kun la subtenintoj. Kaj ne nur H. E. A. trafadas atenton de malnovaj esperantistoj deflankiĝintaj de nia movado, sed ankaŭ tiun de multenombraj novuloj, tiun de gravaj rondoj, tiun de gravaj ĵurnaloj de Madrido, antaŭ ne multe malfavoraj al nia afero, kiel *A. B. C.* kaj *Heraldo de Madrid*; tiun de Aŭtoritatoj kaj eĉ de la Registaro mem. La propagandaj okazintaĵoj plioftiĝis; reviviĝis malnovaj grupoj, fondiĝis novaj, kaj same okazos rapide de ĉi tiu dato en tiun de la Kongreso. La Centra Komitato kun la Regionaj Komitatanoj intense agadas kaj helpas ĉiel. kaj dank' al la neelĉerpeblaj laborkapabloj de la Sekretario de H. E. A., kiu ne laciĝas premadi la klavaron de sia skribmaŝino, por skribi longajn leterojn, priskribante ĉion pri H. E. A. kaj ĝia progreso, pri la Instituto, pri ekzamenoj, programoj, Kongreso, k. t. p., kuraĝigante eniri en niaj vicoj, kaj kiun lojale kaj fervore helpas samideanoj, la AFERO en nia lando rimarkinde bonege progresas, realmilitante samideanon post samideano, urbon post urbo, almmilitante senĉese novajn. Forlasu *sistemuloj* sian neutilan agadon, ĉar neniel ili povos halti-



gi la rezultaton de nobla, honora, fervora laboro por Esperanto en Hispanujo, la mirindan rezultaton, kiu kulminacios en Sevilla, kie tiu laboro elmontriĝos tiel grave konvinkiga per sia dokumentaro, kiel per sia dokumentaro, kiel per sia frukto; kaj tiamaniere, ke ĉiuj estos devigataj unuanime laŭdi ĝin.

Fine, H. E. A. ne malhepas regulan funkciadon de Federacioj ĉe siaj regionoj, ĝi ne estas kontraŭa je tiuj Federacioj, kaj ĉi tion elpruvas, ke dank' al aktiva kunlaborado de la Komitato de H. E. A. kaj madridaj samideanoj kun laboremaj pioniroj de Oviedo, Gijón, k. c., de Asturias; baldaŭ ĉi tiu regiono havos sian Federacion, kaj H. E. A. jam ekstartigis la bazon por tiu de Galicia, ĉar ĉe Pontevedra, Coruña, Ferrol, Lugo kaj Orense, forte renaskiĝas Esperanto.

Nu; kiu volu vidi, vidu; kiu volu konscii, konsci, tial ke faktoj estas tute klaraj.

J. M. R.

H. E. A. AKCEPTAS POŝTMARKOJN POR PAGI LA KOTIZOJN.

GAZETOJ ESTAS PETATAJ SENDI DUOBLAN EKZEMPLERON INTERŜANGE.

ĴUSA SUKCESO DE H. E. A.

Konstatante la antaŭan artikolon jen:

«Ministerio de Internaj aferoj. Ĝenerala Direkcio de Interkomunikiloj. Telegrafo. Fakto 2.^a. Oficejo 7.^a. N.º 18.048. Respondante la peton prezentitan de vi, la 16^{an} de la lasta Februaro pri akcepto de la internacia helpa lingvo Esperanto por la prokrastitaj telegramoj, mi ĝojas komuniki al vi, ke, de la unua de la proksima Majo, estos akceptataj la prokrastitaj telegramoj esperante redaktitaj por la EKSTEREŬROPA INTERNACIA TELEGRAFA KORESPONDADO. Dio vin gardu dum multaj jaroj. Madrido la 30^{an} de Aprilo de 1928. — La Ĝenerala Vicdirektoro. Castañon (parafo). — Al S-ro Prezidanto de la Hispana Esperanto-Asocio »

RIMARKOJ:

Ne estas permesataj prokrastitaj telegramoj en Eŭropo de nacio al nacio.

Esperantistoj multe atentu uzi simplan redaktadon de la prokrastitaj telegramoj per nekunmetitaj vortoj longaj, ĉar alimaniere ni danĝerigos la aferon; uzu, do, nur tre mallongajn kunmetitajn vortojn, kiam estu nepre necese, ĉar la telegrafocistoj devas plenumi severajn ordonojn pri ĉi tio, kaj ili devas ne trovi malfacilaĵojn, suspektojn, kiuj klinos ilin rifuzi la telegramon, kaj eble plendi, kaj tiel malfavori nian konkiron.

Profitante la okazon, sciu, ke H. E. A. ne haltas, kaj ke ĝi ĵus entreprenis tre gravan laboron apud aliaj aŭtoritatuloj por antaŭenpuŝi nian aferon.

PETO AL ĈIUJ SAMIDEANOJ

Ĵus private kaj hazarde alvenis al mi novaĵo, kiu estas tre inda je apogo, kaj mi bedaŭras ne esti informita pri la afero kaj invitita ĉi tiun apogi, ĉar mi ne estus neinta la apogon kaj mi estus propagandinta per ĉi tiu gazeto la aferon. Ion mi scietis, sed ne konkrete, ne kiel projekto de Grupo oficiale alprenita kaj transdonota al samideanoj, Grupoj kaj Asocio, por plej efika rezultato. Jen tio, kion mi sciis ĵus, pri kies tuta vereco mi absolute ne asertas, ĉar, kiel estas dirite, nenion komunikis al mi rekte:

Verŝajne, ĉe kunveno de Grupo en Valencio, oni proponis peti al Ministro de Laboro la Ordenon (Medalon) de la Laboro, por nia simpatia, nelacigebla, fervora kaj agema samideano de Chesto, S-ro Francisco Mañez. Oni akceptis unuanime la proponon, kaj sekve oni faris la peticion, kiun subskribis multenombraj samideanoj, kaj oni nomis S-ron Benigno Luna (de Madrido) komisiito por amasigi petojn kaj subskribojn, kaj ĉi tiu S-ro. plenumis la taskon laŭ sia kriterio, sin turnante persone, parole, al iuj samideanoj, kaj ne atentante aliajn. Kvankam la kriterio de S-ro Luna estas respektinda; mi bedaŭras la konduton, ĉar mi opinias, oni povis multe pligravigi la aferon, se la Komisiito estus sin turninta al la Prezidantoj de Grupoj, raportante pri la afero kaj petante la alprenon de favora decido per ĝenerala kunveno kaj sekve de la peticio; se li (des pli ĉar li estas komitatano de H. E. A.) estus proponinta al la Komitato de nia Asocio la aferon, klarigante ĝin; se li estus koniginta la aferon al mi, ĉar ĉi tiu gazeto estus farinta tion, kion

nun faras. Neniu estus rifuzinta kunlaboradon. Sed feliĉe ne estas malfrue, ĉar kvankam S-ro Luna estu prezentinta peticiojn, la procedo, por komplezi aŭ nei la peticion, disvolvigados dum tempo sufiĉa por ke novaj peticioj helpu la prezentitajn; tial, H. E. A. Grupoj kaj aroj el ne grupiĝintaj samideanoj, izolitaj esperantistoj, estas petataj sin turnu tuj al la aludita Ministro petante la *Medalla del Trabajo* por nia meritplena Francisco Mañez. Ĉi tiu, post kamparlaboro pli longa ol daŭro de l'sunleviĝo al sunkusiĝo, klarigadas sinsekvajn esperantaj kursojn de antaŭ multenombraj jaroj; sed li faris alian homaman laboron, kiu meritas la Ordenon de l'Bonfaremo (Cruz de Beneficencia), ĉar li penadis kaj sukcesis kun S-ro Emilio Gaston (el Zaragozo), Rocamora kaj aliaj (el Barcelona), Comella (el Vich) k. c., gastigi multenombrajn aŭstriaajn geinfanojn. Ĉiuj, do, povas esprimi ĉi tiujn argumentojn, kiel fundamenton, por la peticio. Faru tuj.

Mi volas, fine, senkulpigi S-ron Luna: eble li ne sin turnis al H. E. A. Komitato kaj al mi, konsciante nin malfavoraj je la peto, ĉar ni ne konsentis pri antaŭa iniciativo lia, sed ĉi tiu iniciativo estis tute neebla: li volis (mi ne bone rememoras) ĉu meti S-ron Mañez ĉe la «Honora Tabelo», ĉu ĉe la «Ora Libro» de H. E. A. La unua estas por eminentaj sciencistoj, elpensintoj, literaturistoj, k. c., kiuj estas esperantistoj; nun estas en ĝi, laŭ decido de la Madrida Kongreso, la jenaj S-roj: Leonardo Torres Quevedo, Vicente Inglada, Emilio Herrera, Carlos M. Cortezo. La dua estas por honoro la mortintajn pionirojn de Esperanto. S-ro Luna bone scias, ke la Kongreso de Madrido, ĵus honorinte la mortintojn, honoris nur S-ron Francisco Mañez per dankesprimio.


Julio Mangada Rosenörn

I.^a INTERNACIA ESPERANTA LITERATURA KONKURSO OKAZE DE LA VII.^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

(Sevilla, de la 5.^a ĝis la 9.^a de Novembro, 1928.)

La Loka Organizanta Komitato decidis starigi tri aliajn novajn temojn por ĉi tiu Konkurso, kiu estas organizata sub aŭspicioj de l'Hispana Esperanto-Asocio. Jen ili:

VIII.^a Temo: Kanto al Seviljo.



Pordo al korto de la Fraŭlinoj Alkazaro (Sevilla).

IX.^a Temo: Kanto al Hispanujo.

X.^a Temo: Kanto al Esperantujo.

Ĉiu temo kalkulos minimume 150 versojn, maksimume 200.

Pro tio kaj pro petoj alvenintaj, estis decidate ke la templimo por akcepti originalojn finiĝu la 20.^a de Julio proksima. Ĉiu originalo trafinta Seviljon post tiu dato estos senvalora.

La kondiĉoj por partopreni la konkurson estas la jenaj:

I.^a.—Verkistoj sendos KVIN maŝinskribitajn ekzemplerojn el ĉiu verko kun lemo akompanante fermitan koverton entenantan folion kun la lemo, antaŭnomo kaj nomoj de la verkisto, nacio, urbo, strato kaj n-ro., al Sro. Carlos Martínez, Sekretario-Kasisto de la Organizanta Komitato, strato Rioja n.º 25. — Sevilla (Hispanujo).

II.^a.—Verkistoj nur rajtas partopreni versajn aŭ prozajn temojn, ne ambaŭ, sed jes la VII.^{an}.

III.^a.—Oni ne resendos originalojn, kaj ĉiuj absolute restos proprajo de Hispana Esperanto-Asocio.

IV.^a.—Originaloj estos ricevotaj nepre de la Sekretario-Kasisto antaŭ la 21.^a tago de Julio de 1928.

Originaloj ne koncernantaj la fiksitajn temojn ne estos akceptataj.

Oni aljuĝos sufiĉe gravajn monsumojn, kiel premiojn, al originaloj premiitaj. Sur *Esperanto*, *Heroldo de Esperanto* kaj *Hispana Esperanto*, oni aperigos ĉion pri la Konkurso.

Ĝis nun alvenis dekkvar verkoj kies motoj estas la jenaj: «248 linioj — «Simplulo» — «Veraj homoj fariĝu vi, jen la unua paŝo supren al Dio» — «Septembro» — «Amiko Fidela, trezoro plej bela» — «Certa» — «Ni honoru Zamenhofon» — «Fatamorgano» — «Espero» — «Servu ni al la afero plej ŝatinda sur la tero» — «Nadeje» — «La Pino» — «Esperanto venkos» — «Per bona organizo rapidigu la finvenkon».

Hispanaj kaj fremdaj Esperantistoj monoforu vin iom por grandigi la premiojn al tiuj, kiuj estos triumfintaj en nia Konkurso! Ni akceptas eĉ la plej modestan monsumon; ne forgesu ke maro estas gutaro!

Sevilla. Majo de 1928.—La Sekretario-Kasisto,

Carlos Martínez Fernández

Rimarko: Korespondaĵojn, monsumojn, aliĝojn, k. c., sendu al la Sekretario-Kasisto, strato Rioja, 25. Sevilla.

HIMNO DE LA GRUPO "ANTAŬEN"
DE MADRIDO

I

Atentu la vokon!
Nu; nia Falango,
De loko en lokon,
Ĉe l'pinto de stango
Flirtanta la Verda Standardo,
Senĉese jam kuru;
Labori obstine hun ardo,
Fervore, do, ĵuru!

II

La lingvon diskonu
Tra ĉie senĉese;
Ni lingvon entronu
Rapide sukcese,
Ĉar lingv'Esperanto ja havas
Fratigan la celon;
El lukto Homaron ĝi savas,
Forigas kruelon!
(Komuna parto por ambaŭ strofoj)
Antaŭen kuraĝe
Kun fid'en la koro;
Antaŭen kuraĝe
Al nia laboro
Kun fid'en la koro!

HISPANA ESPERANTO INSTITUTO

Laŭ kelkfoje oni diris, la Instituto ŝanĝos senpage la malnovajn atestojn pri elementa kaj supera esperanta kapableco per la novaj; ĉiuj sin turnu, sendante la malnovajn al ĝia Prezidanto, S-ro. Mariano Mojado-Abascal, 13, Madrid.— kiu resendos ilin kun la nova.

Himno del' Grupo "Antaŭen." Muziko de Francisco Calés
Allegro maestoso Versaĵo de Julio Mangada Rosenörn

Moro

A-ten-tu la vo-ko! Nu

Piano

ni-a fa-lan-go de lo-ko en lo konĉel'pin-to de stan-go flir-

lan-ta la ver-da stan-dar-do sen-ĉe se ĵan kuru; La

intenso

bo-ri - ob-sti-ne, kun ar-do fervore, do, ĵu - ru — *An-*

dimi

cresc.

taŭ-en ku-ra-ĝe kun fid'en la ko-ro, an-taŭ-en ku-ra-ĝe al

cresc.

ni-a la-bo-ro, kun fid'en la ko-ro!

diminuendo

KRONIKO

ENLANDA (*Gijón*).—Nia sperta kaj fervora samideano S-ro. Francisco Menéndez Rúa, ĉe la sidejo de Astura Esperanto-Asocio-str. San Bernardo, 99—klarigas du kursojn, kies lernantoj sin preparas por ekzamenoj pri elementa kaj supera kapableco. Ankaŭ li klarigas elementan kurson ĉe la Asocio de Komercaj kaj Industriaj Oficistoj—str. Covadonga, 36 al dudekkvin lernantoj. Espereblaj estas novaj kursoj ĉe aliaj Asocioj, Kazinoj kaj Kluboĵ ĉar nia nelacigebla samideano sin proponis por klarigi senpage Esperanton.

Esperantista Grupo el anglaj Rotarioj, kies celo estas konigi Esperanton ĉe la Rotariaj Kluboĵ nomis nian spertan kaj fervoran samideanon, Ingenieron kaj Advokaton, S-ron Eduardo J. de Castro, reprezentanto de tiu grupo por Hispanujo. Nia samideano estras ĉi tiean Rotarian Klubon, kaj la samideanoĵ estas petataj havigi al si en la diversaj lokoĵ nomojn de esperantistaj rotarioĵ kaj komuniki ilin al S-ro Castro.

Oviedo. Regule kaj entuziasme funkciadas la esp-kursoĵ de la Ateneo, Katolika Klubo, Orfejo, Socialista Klubo kaj Laborista Rondo, ĉiuj promesas bonan frnkton.

Zaragoza.—La 15.^{an} de aprilo okazis grandioza esp.-mitingo en la ĉefa salono del Círculo Mercantil (Komerca kaj Industria Klubo), pli ol milo da personoj ĉeestis. Ĝin prezidis la urbestro, Moŝta S-ro Miguel Allue Salvador. Ĉeestis S-ro Benigno Luna, kiel Delegito de Hispana Esp.-Asocio.

S-ro Manuel Maynar, advokato, nia nelacigebla aragona pioniro prezentis la oratorojn, dankante la multenombrian ĉeestaron, kiu tiel elmontris sian intereson kaj simpatian al Esperanto, kiu laŭ diris elokvente kaj emocie, estas mirinda idealo krom lingvo. Sekve S-ro Julian García Aguirre salutis je la nomo de la madridaj samideanoĵ kaj de la Grupo «Antaŭen»; S-ro Andres Piño, de Valencio, faris same je la nomo de la Levantina Federacio, salutante ankaŭ Zaragoza'n je la nomo de Valencio, kiu de la unua momento akceptis Esperanton, kaj fine li laŭdis la pacan idealon, kiun Esperanto entenas. S-ro José Oros Gimeno legis multenombrajn aliĝojn kaj saluttelegramojn, el ili tiujn de Sevilla, Barcelona, Madrid, Bilbao, Tarrasa, k. c., kaj sekve paroladis mirinde, plene trafante, pri la reala internacieco kaj utileco

de Esperanto por la aernavigacio, radio, poŝto, telegrafo, kaj aliaj homaj aktivecoj. S-ro Luis Legaz per konvinkanta facila paroladeto rimarkigis kiamaniere estas tre malfacile al la studentaro studi lingvojn, kaj la nepran neceson solvi ĉi tiun problemon por povi akiri plej grandan kulturon, ĉar interrilatigado de la tutmonda studentaro ankaŭ fariĝas necesa. Li klare elpruvis, ke la solvon donis Esperanto, kiu disvastiĝadas ĉe la tutmonda studentaro, kaj kiun devige oni devas instrui en la lernejoj. S-ro Isidoro Achon, varme, flue, elpruvis la vastecon de l'agadkampo de Esperanto, kaj li rimarkigis ke ĉiaj nuntempaj organizaĵoj bezonas internaciajn interrilatojn; fine li esprimis siajn spertojn utiligante Esperanton por vojaĝi al Universala Kongreso. S-ro Manuel Marín Sancho, redaktoro de *El Noticiero*, konstatis, kvankam Ekesperantisto, gravecon de nia lingvo koncerne Turismon, despli ĉar Esperanto estas tre facile lernebla lingvo. P-ro Miguel Sánchez Izquierdo atentigis pri la malamo inter la popoloj kaŭze de diverseco de lingvoj, ĉar diversaj lingvoj en konstanta apartiĝo kreas diversajn animojn, kaj konstanta interrilatigado per komuna lingvo alproksimigas tiujn animojn al komuna sento pri tutmonda paco. Fine la urbestro parolis elokvente pri Esperanto kiel potenca laborilo, kiel supera intelekto-esprimilo, farante paralelismen inter obstino de Esperanto kaj tipa karakterizanta aragona obstino; li gratulis oratorojn rimarkigante ke la unua esp-mitingo okazis kiam oni ekfestadis la tutmondofaman pentriston Goja, la eminentegan aragonanon, kiu mirinde esprimis la internacian lingvon de la koloro. Li promesis helpon al la Afero.

Sekvo de la mitingo. 67 novaj lernantoj ĝis nun, sed oni esperas pliajn; 12 kursoj, 8 en la Grupejo kaj en diversaj lokoj. Raportis vaste pri la mitingo *La Voz de Aragón* kaj *El Noticiero*.

Madrid.—Dimanĉon, 22.^{an} de aprilo, ĉe la Orfejo de la Kuracistoj, okazis esp-festo honoranta D-ron Carlos M. Cortezo, kiun organizis Hispana Esp.-Asocio por esprimi al la D-ro, ke la Asocio konsideras kaj konsideros lin pli efektiva, ol honora prezidanto. La Secretario de H. E. A., S-ro Mariano Mojado paroladetiĝis por esprimi la respektajn, amajn, admirantajn sentojn de ĉiuj hispanaj esperantistoj al Moŝta D-ro Poste D-ro San Antonio sin turnis al la ĉeestantoj per paroloj flua kaj facilkompreneblaj por la orfoj, kiuj formis la aŭdantaron, krom multenombraj gematuraĝuloj, klarigante ke Esperanto

estas paco, amo, laboro kaj profito, per parolbildoj tute klaraj. Sekve la ĥoreto de la Grupo «Antaŭen» kantis hispanajn popolkantojn, dum paŭzo en la kantado, S-ro Benigno Luna rekonstatis atestimon de la hispana esperantistaro al D-ro Cortezo; la ĥoreto kantadis iujn fremdajn popolkantojn post klarigo hispana pri la argumento de ĉiu kanto. La direktoro de la Orfejo, D-ro Van Bomberghen, dankis H. E. A. n., kaj fine elokventege emocie D-ro Cortezo dankis, kaj sin turnante al la orfoj precipe, elpruis ke Esperanto ne nur estas paco, amo, laboro kaj profito, sed ankaŭ konsolo, kiel diversfoje, eĉ tiun tagon mem, li spertadis, kuraĝigante la orfojn alpreni Esperanton kaj rekomendante ne forgesi ĉi tiun belan tagon. Ne necese estas paroli pri aplaŭdoj.

La orfoj por honori la vizitantojn kantis kaj dancis kaj ili regalis la gekantantojn de la ĥoreto per kukoj kaj delikataj vinoj.

La festo estis rimarkinde simpatia, tutplene rondfamilia, kaj sufiĉe bone kaj longe raportis pri ĝi la ĵurnaloj *El Imparcial* kaj *La Libertad*.

Ĝus oni starigis leĝe la Hispanan Ligon de Esperantistaj Fervojo-ficistoj, kies celo estas disvastigi Esperanton inter la Fervojo-ficistoj kaj alproksimigi ĉi tiujn al ceteraj samprofesiuloj de la tuta mondo tute neŭtrale de la vidpunktoj politika, religia kaj socia. La nova Ligo enkalkulas jam grandan nombron da aliĝintoj en la tuta Hispanujo, kaj ĝin estras S-roj: Luis Rodríguez Escartín, Prezidanto; Emilio del Barrio Martín, Sekretario-Bibliotekisto; Ricardo González Peral, Kalkul-trezoristo. Adreso: Liga Española de Ferrovianos Esperantistas, Apartado 820-Madrid.

Cheste.—S-ro Cayetano Redondo, de Madrido, faris gravegan paroladon pri Esperanto por la laboristaro, la 27.^{an} de la ĵus pasinta aprilo, en la laborista Societejo, atinginte grandan sukceson. Ĉi tiu parolado certe helpos bonege la nelacigeblan kaj tre rimarkindan laboron de nia kara kunbatalanto S-ro Francisco Mañez.

EKSTERLANDA

JAPANUJO (*Tokio*).—La Medicina Fakultato de Keio Universitato havas esperantan grupon el 40 membroj (profesoroj, docentoj, medicinistoj, studentoj kaj malsanulistinoj). Kaŭze de la impresa kurso per radio Japana Esp.-Instituto akiris ĉ. 200 novajn membrojn ĝis fino de januaro, kaj la blindaj samideanoj brajligis la kurson organizante la instruadon en Tokia Lernejo por Blinduloj. Pli ol 500 personojn ĉiutage

vizitis la esp.-ekspozicion en la kvina Liceo. Al la tre prosperanta esp.-movado en medicina rondo aliĝis Meiji Farmakologia Kolegio de Tokio, kies estro S-ro Kuraci-Eiĝi gvidas kurson por preskaŭ la duono el la studentaro de la Kolegio, kaj ĝia oficiala organo ĉiumonate aperigas esp.-lecionojn. La Ĵurnalista Ligo de Tokio, konsistante proksimume el 2.000 membroj en tuta Japanujo, decidis alpreni esperanton kiel sian oficialan lingvon por interrilatoj kun fremdlandoj, kaj tute sekve ĝi esperantigis la titolon de sia organo «Gogri» («La Ekstra»); tial la Ligo uzos nur Esperanton por cirkuleroj kaj korespondado, k. t. p., al alilandaj ĵurnalistaj ligoj, proletariaj unuiĝoj kaj Esp.-societoj; aperigos esperantan kolonon sur la organo, kaj klarigos esp.-kursojn por la membroj (adreso: S-ro Okasaĉio. Internacia Fako, Tokio Remmei, Hitocubaŝi, Kanda. Tokio. Plie ĉie Esperanto rapide progresas.

ĈINUJO (*Shanghai*).—La Nacia Laborista Universitato en ĉi tiu urbo envicigis Esperanton devige en la instruplanon.

En Manĉurio, pro iniciato de Esp.-Societo en Mukden, fondiĝis Manĉuria Esp. Federacio, al kiu aliĝis la societoj de Dairen kaj Kaigen. Adreso: Anatomia Fako de Manĉuria Fakultato de Medicino en Mukden, kies profesoroj estas esperantemaj.

ĈEĤOSLOVAKUJO (*Praha*).—«Esperanto kaj Komerco», grava organizaĵo el ĉeĥoslovakaj esp. komercistoj, okazigis sian duan ĝen. Kunvenon ĉe la Komerca Ĉambro. La ĉefaj raportoj vidigis celkonscian laboradon, kaj tre firman organizan kaj financon fundamenton, kiel rezulton de la unua jaro. Ĝi akiris amikajn rilatojn kun samspecaj alilandaj organizaĵoj, kaj starigis proprajn reprezentantojn-korespondantojn en la plimulto el eŭropaj ŝtatoj. Ĉi tie estas Esp-kurso por ĝendarmoj.

ANGLUJO (*Londono*).—Ĵus oni fondis la Kompanion «The Esperanto Publishing Company, Ltd.» por stimuli la eldonadon de altklasa Esp. Literaturo en Britujo. La unuaj direktoroj de la K-io estas S-roj Robert Robertson, Edmund W. Willcocks kaj Cecil C. Goldsmith. Ĝi estas tute sendependa de la Brita Esperantista Asocio, sed la du organizaĵoj kunlaboros plenharmonie. La K-io faros komercon nur pogrاند; mendojn detalajn plenumos la B. E. A. kaj librovendistoj en la kutima maniero. La unua libro eldonata estas: «Pri la origino de l'hom», verkita de Prof. Sir Arthur Keith. Ĝi konsistas el lia ĉefa Prelego en

1927 al la Brita Asocio por la Progresigo de la Sciencoj, kaj naskis grandan polemikon. Ĝi enhavas klarigajn ĉapitrojn poste aldonitajn de la aŭtoro. La verkon tradukis Prof. W. Brown kaj S-ro F. R. A. Mc. Cormick, kaj ĝin eldonas la K-io pro afabla permeso de la aŭtoro kaj de la eldonistoj de la angla eldono S-roj Watts, & K-io. Tuj aperos la romano «Luno de Izrael», verkita de la mondkonata aŭtoro Sir H. Rider Haggard kaj tradukita de S-roj E. S. Payson kaj M. C. Butler. Ne longe antaŭ sia morto la aŭtoro permesis la tradukon, kaj la posedantoj de la kopirajto S-roj John Murray ankaŭ donis permeson. Aro el anglaj rotarioj, kiuj estas esperantistoj, fondis grupon kies celo estas konigi Esperanton ĉe la Rotariaj Kluboj.

KANADO.—La Kongreso de Monda Federacio de l'Societoj de Edukado, okazinta en *Toronto* la lastan aŭguston, decidis unuanime uzon de helpa lingvo internacia kaj ke komisiono atente studu la problemon.

AŬSTRIO.—La Administra konsilantaro de *Vieno* decidis organizi 24 novajn kursojn pri Esperanto en normal-lernejoj de la ĉefurbo. La Instruista Seminario de *Ströbersdorf* enkondukis fakultative en la programon instruadon de Esperanto.

La fremdulfrekventa oficejo de la Ministrejo por komerco kaj trafiko ĵus eldonis belegan dekdupaĝan ilustritan gvidfolion en nia lingvo, 20.000 ekzemplerojn, pro instigo de ĉefinspektoro H. Steiner, kiun la Esperantistaro devas danki. Esperantistoj sin turnu al Österreichisches Verkehrsbureau, Wien I., Friedrichstrasse, 1., petante ekzempleron.

BULGARUJO. — La Komitato de Unio de Bulgaraj Fervojistoj decidis:

I.e Enkonduki esperantan rubrikon en sian organon, por interisigi la membrojn alpreni kaj uzi Esperanton, kaj por informi eksterlandan kolegaron pri sia agado;

II.e Uzi kiel eble plej baldaŭ Esperanton, kiel solan lingvon, por la internacia korespondado kun la Oficejo de la Unio.

Burgas.—Ĵus aperis la I.^a N.^o de Biblioteko «Nova Kulturo», kies abonprezo estas 3 sv. fr. aŭ egalvaloro. Ĉi tiu Biblioteko celas disvas-tigi novan spirita-okultan movadon de «Universala Blanka Frataro», kies fondinto estas la Majstro Petro Danow, de Sofio, kie li publike paroladas pri ŝia instruo. La I.^a N.^o estas tibolita «La Alta Idealo», 23-paĝa. Adreso Ataoas Nikolov. Str. «Câr Iv. Șîșman», 19.

HUNGARUJO.—Hungara sekcio de turista asocio «La Natur-amikoj», *Budapest*, decidis, je la lasta februaro:

I.e Rekomendi en la proksima Kongreso internacia de l'Naturamikoj studon de esperanto;

II.e Malfermon de Esp.-kurson en ĉiuj grupoj kaj sekcioj;

III.e Uzi Esperanton por la internaciaj rilatoj;

IV.e Enkonduki regulan Esp.-rubrikon en sia oficiala organo. La Internacia Foiro vaste uzos Esperanton; per Esperanto ĝin vizitoj grava karavano el diversaj naciuloj.

FINLANDO.—Ĝus oni enkondukis Esperanton en la tri klasojn de la normal-liceo finlanda, en *Helsingfors*, kie la instruistoj-studentoj de la instruista seminario devas doni siajn unuajn provleciojn. La instruado estas deviga por la kursanoj.

ITALUJO.—Faŝista Instrua Instituto de *Brescia* enkondukis Esperanton en sian programon.

HOLANDUJO.—Komerca Instituto Schoevers en *Hago* enkondukis Esperanton en sian programon, organizinte kursojn pri la lingvo. La Oficejo por Fremdul-trafiko de *Dordrecht* publikigis esp-prospekton.

FRANCUJO.—La Urba Lernejo por Eksterlanda komerco kaj Re-prezentado en *Parizo*, kie oni instruas Esperanton libervole, okazigis unuafoje ekzamenojn por doni oficialajn diplomojn pri Esp.-kapableco.

GERMANUJO.—Oficejoj por Fremdul-trafikoj de *Stettin* kaj *Dresden* publikigis esp-prospektojn. Okaze de la kvarcenta mortotago de la tutmond fama pentristo Dürrer la urba turisma Oficejo uzas Esperanton por la okazigo de la memorfestoj.

POLUJO (*Lwów*).—Ĝus oni fondis «Internacia Esp. Muziksocieto» por propagandi efike Esperanton per muziko, kaj por tio jen la plano:

I.e Fondi lokajn sekciojn en multaj diverslandaj urboj;

II.e Starigi centran muziksocietan sekretariojn;

III.e Starigi internacian komitaton por fari bonajn esperanto tradukojn de muziktekstoj;

IV.e Eldoni la aprobitajn tradukojn;

V.e Arangi publikajn Esp.-koncertojn per radio;

VI.e Arangi Esp.-koncert-rondvojaĝojn de eminentaj geartistoj;

VII.e Eldoni esperantajn originalmuzikverkojn;

VIII.e Eldoni muzikterminaron;

IX.^e Eldoni broŝurojn pri muzikaj aferoj aŭ pri famaj muzikartistoj.
X.^e Fondi internacian muzikgazeton.

Ĉiuj, kiuj interesiĝu, sin turnu al S-ro Henryk Schnützer, strato Jagiellonska, 17.—sendante proponojn, sciigojn, materialon, ĉion ajn koncerne la aferon, aliĝojn.

RIMARKO de H. E. De la pasinta somero funkciadas kun granda sukceso la ĥoreto de la Grupo «Antaŭen» de Madrido, kies repertuaro konsistas el multenombraj hispanaj popolkantoj, marŝoj, himnoj, kaj fremdaj popolkantoj, el ĉi tiuj un franca. alia svisa, alia turka, alia finna, tri svedaj, du germanaj kaj ses polaj, tute en Esperanto. Kaj tiu ĉi grupo pere de S-ro Mangada Rosenörn sendis al la ĵus fondita I. E. M. popolkantaron de Murcia, kaj aliajn kantojn kaj muzikaĵojn, por hispana muzikfesto en Lwów.

SENDU KIEL EBLE PLEJ BALDAŬ VIAN KOTIZON POR HISPANA ESPERANTO ASOCIO. SE VI SENDUS SAMTEMPE TRI PLIAJN PESETOJN VI RICEVŬS ĈI TIUN GAZETON, KAJ KIEL DONACON, LA UNUAN APERINTAN KAJERON DE «DON KIĤOTO» KAJ APERONTAJN DUM LA JARO DE TIU TUTMONDFAMA VERKO, KAJ LA HISTORIAN NOVELON EN PROZO KAJ VERSO «FERDINANDO VI^a KAJ FARINELLI». RAPIDU SENDI LA KOTIZOJN PETANTE LA LIBROJN, ĈAR LA RAJTO POR LA DONACO FINIĜOS. FREMDULOJ RAJTOS SAME, KIEL ENLANDANOJ, SENDANTE KVIN SVISAJN FRANKOJN PER POŝTĜIRO.

ENLANDANOJ sin turnu al S-ro MARIANO MOJADO, strato ABASCAL, 13, MADRID.

FREMDULOJ al S-ro JULIO MANGADA ROSENORN, Glorieta de Bilbao, 5, MADRID (Ĉi tiu akceptas dolaran bankvileton aŭ francajn bankbiletojn).

«DON KIĤOTO» nur havigos aparte S-ro Ludoviko Torrent (Presejo. Strato Santa Teresa, 16-Madrid), al kiu povas sin turni por mendoj interesatoj. S-ro Torrent faros rabaton, 10%, kian mendo minimume atingos 50 specimenojn; por mendo de 250, 500 kaj 1.000 specimenoj, la respektivaj rabatoj estas 20%, 30% kaj 40 %. Ĉiam estas postulata antaŭpago.

PRESEJO LUDOVIKO TORRENT KAJ K^o
Santa Teresa, 16.-MADRID-HISPANUJO